# *Pintkunsido de la antiimperiisma junularo memore al Che Guevara*




Havano, 22 nov (RHK) Bolivio sin preparas por akcepti ?irka? 2 mil gejunulojn  el diversaj landoj kiuj partoprenos la duan pintkunsidon de antiimperiismaj junularoj, okazonta la 2-an kaj 3-an de decembro en la Vilao Tunari, en la departemento de Cochabamba.

La eventon oni dedi?os al la 50-a datreveno de la alveno de la komandanto Che Guevara al tiu andina lando, la? raportis la organiza komitato, kiu sciigis ke delegitaroj el 8 landoj iberoamerikaj konfirmis sian ?eeston.

La programo de la evento anta?vidas debatojn pri temoj kiel agreso kaj imperiisma interveno politika kaj milita kontra? la suvereneco de la popoloj, la defendo de la Patrino Tero kaj la uzado de la sociaj retoj kiel novaj scenejoj por la antiimperiismaj bataloj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/112831-pintkunsido-de-la-antiimperiisma-junularo-memore-al-che-guevara

**Radio Habana Cuba**